

La kantoj de l' ĉieloj

M: ERHEBT IN VOLLEN CHÖREN

(originale verkita en Esperanto)



1. La kan-toj de l' ĉi - e-loj vin glo-ras, Di-Pa-trin'.

refreno: La him-noj de l' an - ĝe-loj vin laŭ-das, Vir-gu - lin'.



Sank - ta Ma - ri - a, sank - ta Ma - ri - a,



Di - Pa - trin', Vir - gu - lin', ter', ĉi - el' pri - kan - tu vin!

2. Vin kultas, ho Maria, kun ĝoj' la eklezi'
per festo liturgia, pilgrima procesi'.
3. Vi, Sanktulin', ekbrilas en apud-Dia hel'.
Vi, Di-Filin', jubilas en graco-plena bel'.
4. Patrino de la graco, virgeca, sen makul',
reĝino de la paco, filin' de l' Plejaltul':
5. Ho Virgulin' glorinda, laŭdinda sen kompar',
ho vi, patrin' aminda, brilanta stel' de l' mar':
6. Spegulo de l' justeco, ho ĝoj' de Izrael',
sidejo de l' saĝeco, pordego de l' ĉiel':
7. Vi, turo el eburo, vi, dom' el pura or',
miraklo de l' naturo, sendorna rozo-flor':
8. Konsol' de l' kristanaro, patrin' de l' eklezi',
azil' de l' pekintaro, reĝin' de l' rozari':
9. Mi petas, Virgulino: Vi turnu vin al mi.
Min benu, Di-Patrino. Konduku min al Di'.

Pilgrima procesia kanto

LA KANTOJ DE L' ĈIELOJ • M (Erhebt in vollen Chören): Martin el Cochem 1712 • nGL (Speyer) 875, tie G-majora • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2010-10-24, en la monato de l' rozario, parte el la Loreta Litanio, ADORU 019.5

Verku mem pliajn strofojn, ekzemple konkretajn petojn!

(Pilgrimaj aŭ procesiaj kantoj kutime havas tre multajn strofojn, ofte kun senpretendaj rimoj.)